

| | |
|---|---|
|  <p>Universala Esperanto-Asocio</p> |  <p>ESTRAR-TEAMO EKSTART' DE AMO</p> <p>Estrara Subteamo: MOVADO</p> |
|---|---|

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne).

Plie al: la Komitato, Konsilianoj, ILEI, TEJO, Regionaj Komisionoj, listoj kaj unuopuloj

Estraro laboris, kunlaboris

La printempa estrarkunsido de la estraro de UEA okazis lastsemajnfine (28-30 marto) en la Centra Oficejo en Roterdamo. Ses el sep estraranoj ĉeestis fizike, nia ĉilia estrarano José Antonio Vergara partoprenis skajpe, kiel ankaŭ dum iom da tempo la redaktoro de la revuo, Fabrício Valle, la prezidantino de ILEI, Mirejo Grosjean, Katalin Kovats de <edukado.net> kaj la KER-ekzamenoj kaj LKK-anoj el Lillo. Por TEJO engaĝiĝis surloke Veronika Poór. Kiel kutime partoprenis la direktoro de la oficejo, Osmo Buller, plus pliaj oficistoj laŭbezone. La kunsidojn gvidis la prezidanto de UEA, Mark Fettes.



Prezidanto kaj la Ĝenerala Sekretario tablokape

Ege resume... Estrarano Lee Jungkee raportis pri la sukcesa Unua Irana Kongreso, kiun li vizitis survoje al Nederlando. Ĝenerala Sekretario Martin Schäffer simile raportis pri la unua Kongreso de Nikaragvo. Barbara Pietrzak traktis kongresajn planojn, inkluzive de Belartaj Konkursoj. Stefano Keller proponis kiel UEA eluzu proklamitajn Jarojn de UN; ekzemple pri la komenciĝanta Jardeko de Interproksimiĝo de la Popoloj.



Barbara Pietrzak en animita konversacio kun Martin Schäffer kaj Veronika Poór, dum desupre rigardas (espereble aprobe) la tuta prezidantaro de la Asocio.

Ni planas faciligi la vojon por novaj asocioj pretigi siajn aliĝpetojn al la Asocio. Ni diskutis multe la aktivigon de nova aspekto por la nuna retejo de UEA kaj modernigon de la libroserva oferto. Ni aŭdis freŝajn evoluojn pri la sekvontaj kongresoj; esploroj pri 2016 estas farataj, cele al decido ene de la sekvaj monatoj. Laste ni studis buĝetproponon por 2015 kaj faris intervenojn por malaltigi (ĉefe estrarajn) kostojn kaj pli optimismi ĉe donacoj, tiel ke pli da rimedoj fluu al Movada Evoluigo, konforme kun la prioritatoj de la Strategia Plano.

La supra raporto estas nur resuma. Pli oficiala, aprobata raporto estas verkita; ĝi kovras ĉiujn signifajn diskutitajn terenojn, tion tre baldaŭ ricevos ĉiu komitatano kaj komisionano, rekte de la prezidanto.

Plia estraro, eĉ tuje

La estraro de TEJO kunsidos en Novara, Italio, tre baldaŭ poste (11-14 apr.). La observanto de UEA estos, kiel same lastnovembre, la vic-prezidanto, Stefan MacGill, cele al daŭrigo kaj intensigo de la kunlaboro inter UEA kaj TEJO. Tio rilatos unuavice al la programo de AMO-seminarioj, ĉar TEJO

jam havas ampleksan programon de aktivula trejnado, kiu povas utili al UEA. Alia komuna temo estas la starigo de rete bazita inform-kolektilo por ekhavi pli bonan bildon pri la atingoj, bezonoj kaj obstakloj en niaj Landaj kaj Fakaj Asocioj. TEJO uzas projekton [KODEJO](#) tiucele; UEA aspiras transiri de permana inform-arigado al pli aŭtomata sistemo.



Kreskanta kunlaboro – neatendita AMO

Ŝajnas, ke en 2014 okazos jam sep AMO-seminarioj; ĉiu nun havas sekuran (sed modestan) financon apogon de UEA.

El la kunsidoj venis surpriza ideo, ke la nunjara [Internacia Junulara Kongreso](#) en Fortalezo, Brazilo, (18-25 julio) provizos per ideala loko okazigi AMO-seminaron. Konvenaj publiko kaj gvidantaro jam troviĝos surloke, kaj tio kontentigas la jam esprimitan deziron, ke ankaŭ Sud-Ameriko gastigu sesion. Tiu seminario por nun ne eniros la numer-vicon, kaj fariĝos AMO-IJK.

Sekvos serio da impresoj kaj materialoj pri la okazinta [AMO-1](#) en Horány, Hungario. Al la gvidintoj kaj kunorganizintoj en HEJ, ni reeĥas la ĵus senditajn dankojn de UEA.

Pri AMO-2 en Sidneo, Kanado, klaku <http://esperanto-AMO-2>.

Pri AMO-3 en Siano, Ĉinio, klaku <http://www.esperanto.cn/amo/>

Pri AMO-4 en Fai della Paganella (Trento), Italio, klaku <http://kongreso.esperanto.it>.

Pri pliaj jarfinaj seminarioj ni informos baldaŭ.

Postnoto: AMO-IJK ricevis la numeron 3.

Do AMO-CN ricevis la numeron 4
AMO-IT ricevis la numeron 5

Ferme, jen pliaj bildoj el la estrarkunsido de UEA:



Estrarano Lee Jungkee ricevas ekzamenan diplomon (KER - C1) de Osmo Buller, la Ĝenerala Direktoro de UEA.



Lee Jungkee starigas demandon al Stefan MacGill, kiu serĉas respondinspiron. Certe temis pri la laboro de la subteamo 'Movado'.



Stefano Keller pensante kiel efike informi dum la baldaŭa UK. Al li ni dankas ĉiujn fotojn de la estrarkunsido.